



# CONFEDERACIÓN GENERAL DEL TRABAJO

## Secretariado Permanente. Comité Confederal

Sagunto, 15 – 1º 28010 Madrid

Teléfono: 91 447 57 69 – Fax: 91 445 31 32

spcc.cgt@cgt.es [www.cgt.es](http://www.cgt.es)

Madrid, la 30a de septembro de 2008

## Rezolucio de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro pri la "striko" dum 15 minutoj de la tuja 7a de oktobro

Reage al la alvoko de striko dum 15 minutoj apogita de la ESK (UGT kaj CCOO) en Hispanio) kontraŭ la EUa gvidlinio pri ampleksigo de la labora deĵordaŭro ĝis 65 horoj, la Plenkunsido de la Konfederacia Komitato de la CGT **MANIFESTAS:**

1. La alfrontan kontraŭstaron de la CGT kontraŭ tiu ĉi mezuro, kiu klopodas neniigi la atingaĵojn de la luktoj kaj depostuloj de la laborista klaso dum jarcentoj. Tia agreso supozas gravegan atakon kontraŭ la laboraj kondiĉoj de la laborista klaso entute kaj malprogreson de la socio, kiu kondukas nin al stato, similanta tiun de la 19a jarcento.

2. Ke la CGT ne aliĝas al la alvoko, ĉar ĝi taksas, ke la alvokantaj sindikatoj de la ESK en Hispanio estas kunkulpuloj pri la aprobitaj politikoj kontraŭ la gelaboristoj kaŭze de la senĉesaj paktoj kaj silentoj, kiujn ili tenadas antaŭ la agresoj al la laboraj rajtoj ĉe la eŭropa kampo.

3. Ke la CGT realigos daŭrajn **mobilizajn kampanjojn** kontraŭ tiuj ĉi agresoj ĉe ĉiuj frontoj: ĉe ĉiuj entreprenoj, kun la tuta laborista klaso kaj antaŭ la tuta civitanaro. Samtempe ĝi postulos en la kolektivaj kontraktoj la enkondukon de klaŭzoj, kontraŭstarantaj la aprobitajn eŭropajn gvidliniojn, **postulante la deĵordaŭron de 35 horoj semajne, la firmigon kaj reakiron de la sociaj publikaj kaj bonkvalitaj servoj, cele al ties rekta administrado fare de la publikaj administracioj kaj al la defendo de la sociaj kaj laboraj rajtoj.**

4. Ke la CGTaj kampanjoj, kiuj komencis je septembro, disvolvados ĉe ĉiuj laboraj centroj kaj urboj de la tuta hispana geografio, por kunfluiĝi en protesta **koncentrado** antaŭ la **Ministrejo pri Laboro la venontan 3an de decembro**. Samtempe ni laboras por realigi depostulantajn kaj *mobilizigajn agadojn ĉe la eŭropa kampo* por kunfluiĝi kun aliaj organizaĵoj en unuiga ago dum la 2009a printempo. Ni ne flankenigas la eblon de **ĝenerala striko**, se la socio petas ĝin.

5. Ke la CGT traksas tiun ĉi alvokon kiel nuran maskon por kaŝi la kunkulpon de tiuj ĉi sindikatoj pri la nuna labora situacio kaj aperi antaŭ la socio kiel defendantoj de la rajtoj de la gelaboristoj, kvankam tage post tage ili stimulas la perdon de laboraj rajtoj per la kolektivaj kontraktoj, kiujn ili signas. Per iliaj agoj malebligas la unuiĝon de la laborista klaso, hodiaŭ ili alvokas striketon, sed morgaŭ ili signas laboran reformadon, kiu malpliigas la garantiojn de la plejmulto el la laboranta loĝantaro.

Tamen la CGT ĉiam repektis la individuan agadon de sia aliĝintaro rilate de la aliĝo al alvokoj, realigitaj de aliaj organizaĵoj, se ĝi kredas, ke kun ĝia apogo oni defendas la ĝeneralan intereson de la laborista klaso.